

Streta vojo al fora interno¹

Matsuo Bashō²

tradukis SASAKI Teruhiro

Ĝis la ekiro

Monatoj kaj tagoj estas pasantaj gastoj por eterne dum multaj generacioj, kaj ankaŭ irantaj-venantaj jaroj estas similaj al vojaĝantoj. Por tiuj, kiuj maljuniĝas flosante sur boato tra la tuta vivo, aŭ kondukante ĉevalon, ĉiuj tagoj estas vojaĝado mem, kaj la vojaĝo estas ilia loĝejo. Ankaŭ multaj antikvuloj mortis dum la vojaĝo. Ankaŭ mi, de kiam mi ne scias, allogate kiel numero ŝvebanta laŭ vento, sopiradis senĉese al vagabondado kaj vagadis laŭ marbordoj. Tiel en aŭtuno pasintjare mi revenis de vojaĝo. Mi forbalais malnovajn araneaĵojn en mia domaĉo ĉe la rivero Sumida, kaj jam ĉirkaŭ la fino de la jaro mi ekdeziris nepre vojaĝi trans la nordan barieron de Shirakawa³, la pordon al norda provinco en la komenco de printempo sub la ĉielo kun strioj da nubetoj. Mian koron obsedis kaj frenezigis la vagabonda demono, kaj plie eĉ la vojodio alvokis min al vojaĝo, kaj do mi abrupte kaj rapide pretigis min por vojaĝo, flikante truojn de pantalono, renovigante ŝnurojn de kanĉapelo. Jam mokse kaŭterizinte al mi krurojn, mi sopiris antaŭ ĉio la lunon sur Matsushima⁴, la pitoreska norda golfo. Loĝejon doninte al aliulo, mi iris al la ermitejo de Sampū⁵. Tiam mi metis sur la pilastron de la domaĉo paperon kun ok

¹ Streta vojo al fora interno: esearo sub la titolo Oku no Hosomichi (hosomiĉi) de Matsuo Bashō, pri la vojaĝo en 1689, eldonita en 1694

² Matsuo Bashō (macuo baŝoo): 1644-1694, fama hajkisto en la epoko de Edo(1603-1867)

³ Shirakawa (ŝirakaŭa)

⁴ Matsushima (macuŝima)

⁵ Sampū (sampoo): 1647-1732, disĉiplo kaj mecenato de Bashō

versoj, unu el kiuj estas jene:

Nun tempas ŝanĝi
loĝantojn de l' domaĉo.
Pupfestos ili.

Ekiro

La 27an de marto¹, mi ekiris, kiam aŭrora ĉielo elkrepuskiĝis. La luno perdis sian brilon en la matena lumo kaj la pinto de Fuĵi-monto estis apenaŭ videbla. Mi sentis min trista, pensante kiam mi povos denove vidi branĉojn de sakuroj sur la montetoj de Ueno kaj Yanaka². Korproksimaj kolektiĝis de la lasta vespero, kaj akompanis min kune enŝipiĝinte. Mi elŝipiĝis ĉe Senju³, kaj mi verŝis larmojn pro disiĝo de la efemera mondo. tiam mia koro pleniĝis de la penso pri 3000 leŭgoj⁴ de la vojo kuŝanta antaŭ mi.

Printempo pasas.
Jen pepas birdoj; larmas
okuloj fiŝaj.

Per ĉi tiu hajko komenciĝis mia vojaĝkajero, sed mia paŝo ne tuj antaŭen iris. Karaj homoj, starante vice sur la vojo, volis forvidi nin probable ĝis niaj dorsoj ne videblis.

Sōka⁵, la unua etapo

Ĉi-jare, en la 2a jaro de la erao Genroku⁶, mi nur senprudente ekpensis longan

¹ la 27a tago de marto: la 16a de majo 1689 laŭ la nuna kalendaro

² Yanaka (janaka)

³ Senju (senĵu)

⁴ 3000 leŭgoj: ĉ. 12000 km

⁵ Sōka (sooka)

⁶ la 2a jaro de la erao Genroku: 1689 p.K.

vojaĝon al Ŭu¹ spite al mia maljuneco por la longa vojo. Pri tiu loko mi nur aŭdis sed ankoraŭ ne vidis per miaj propraj okuloj. Mi esperis nur ambiguan fortunon, ke mi povos reveni ĉi tien vivanta. En tiu tago mi atingis la etapan urbon Sōka. Antaŭ ĉio mi suferis de pakaĵo sur miaj malgrasaj ŝultroj. Mi volus ekiri, havante nenion krom mi mem, sed mi ne povis forĵeti tiujn aĵojn: unu paperan veston por nokto, leĝeran kimono, aĵon kontraŭ pluvo, tuĉon kaj tuĉpenikon ks, kaj adiaŭajn donacojn, kiujn mi ne povis rifuzi. Tiuj aĵoj neeviteble fariĝis ĝenaj ŝarĝoj por la vojo.

Muro-no-Yashima²

Mi vizitis la sanktejon, nomatan Muro-no-Yashima. Mia akompananto Sora³ diris al mi: “La diino ĉi tie nomiĝas Kono-hana-sakuyahime⁴, la sama diino de Fuĵi-monto. Ŝi bruligis sin en senfenestra ĉambro por pruvi sian senkulpecon, ĵurante sian ĉastecon, kaj ĝuste tiam naskiĝis la diido, nomata Hohodemi, t.e. dio el fajro. tial oni nomis la sanktejon Muro-no-Yashima, t.e. senfenestra ĉambro de Yashima. Laŭ la legendo estas kutimo versi poemon asocie kun fumo.

Ĉi tie estas ankaŭ malpermesite manĝi fiŝon konoshiro⁵. En la mondo estas transdonita tiaspeca superstiĉo.

Budho Gozaemon

La unuan de aprilo⁶, ni tranoktis ĉe la piedo de la monto Nikkō⁷. La gastejestro diris: “Mi nomiĝas Budho Gozaemon. Ĉar principe mi penas esti honesta, oni nomis

¹ Ŭu (oou): malproksima norda provinco

² Yashima (jaŝima)

³ Sora: 1649-1710, disĉiplo de Bashō

⁴ Kono-hana-sakuya-hime (kono-hana-sakuja-hime): princino de arbofloroj en mito

⁵ konoshiro (konoŝiro): Konosirus punctatus

⁶ la unua de aprilo: la 19a de majo laŭ la nuna kalendaro

⁷ Nikkō (nikkoo)

min tiel. Do bonvolu ripozi trankvile kiel hejme, kvankam nur unu nokton de la vojaĝo.” Mi atente rigardis lin, kion li faros por helpo al almozuloj kaj pilgrimuloj, same kiel Budho aperinta en la malpura polvoplana mondo. tamen li montriĝas neinteligenta, senprudenta sed honesta obstinulo. Lia vasta simpla animeco egalas al la alta virto, kiel dirite de Konfuceo; oni devas estimi tian denaske puran karakteron.

Nikkō¹

Ni adorvizitis la sanktan monton. Antikve oni nomis la monton Futara-san². Tamen kiam Granda Ĉefbonzo Kūkai³ establis templon, li ŝanĝis la nomon de la monto al Nikkō. Kūkai antaŭvidis futuron tra multaj jaroj; nuntempe lumo de la templo brilas en la tuta ĉielo, la favoro estas plena ĉiuflanke, popoloj de kvar klasoj vivas pace kaj trankvile. Ju pli granda estas la gloro, des pli malvolonte mi emas skribi pro respekto.

Ho, kiel kara!
tra folioj verdaj-junaj
sunlumo brilas.

La monton Kurokami⁴ kovras nebuleto, kaj la neĝo sur la pinto ankoraŭ restas blanka. S-ro Sora versis jene:

Mi, forrazita,
alivestiĝis tie ĉi
per nigra vesto.
(Sora)

¹ Nikkō (Nikkoo): la nomo signifas sunlumon.

² Futara-san: la nomo signifas du dezertojn.

³ Kūkai (kuukai): fama bonzo (774-835). La fakto estas, ke vera establinto estas la bonzo Shōdō (ŝoodoo).

⁴ la monto Kurokami: la nomo signifas nigrajn harojn.

S-ro Sora devenas de la familio Kawai, kaj estis nomita Sōgorō¹. Li helpis al mi hejman mastrumadon, loĝante najbare al la ermitejo de mi, Bashō. Ĉi-foje li kun ĝojo akompanis min por kune vidi pejzaĝojn en Matsushima² kaj Kisakata, kaj li volis malpezigi miajn malfacilaĵojn en la vojaĝo. Matene de la ekira tago li forrazis kapharojn, metamorfozis sin en la nigra bonza vesto, ŝanĝis eĉ nomon de Sōgorō al Sōgo. tial estas versita la supra hajko pri la monto Kurokami. La vorto, “alivestiĝis”, sonas forte.

Kiam ni supreniris iom pli ol 20 ĉoojn³, ni trovis akvofalon. El la pinto de roko ĝi falas 100 ŝakuojn⁴ en la verdan basenon ĉirkaŭitan de multegaj rokoj. Oni nomis ĝin “akvofalo videbla de malantaŭo”, ĉar oni povas vidi ĝin, enirante en la kavernon malantaŭ ĝi.

Kelktempe restis
mi malantaŭ akvofal',
somerkomence.

Nasu

En la loko nomata Kurobane⁵ de la distrikto Nasu, loĝas miaj konatoj. Tial nun ni prenis rektan proksiman vojon, trairante sovaĝan kamparon. tre malproksime trovinte unu vilaĝon, ni celis tien. Ekpluvis kaj vesperiĝis. Ni, petis kamparanon por tranokti en lia kabano. Post la tagiĝo ni denove iris sur kamparon. Ni trovis ĉevalon paŝtiĝantan sub libera ĉielo. Ni alvenis al viro falĉanta herbon; li, kvankam kampulo, ja ne estis senkompatema. Li diris. “Kion fari? Tamen tiu ĉi kampo estas disdividita en diversajn direktojn. Povas vojaĝantoj kiel vi perdos la vojon. tial bonvolu uzi ĉi

¹ Sōgorō (soogoroo), Sōgo (soogo): la nomo signifas klarecon.

² Matsushima (macuŝima)

³ 20 ĉooj: ĉ. 2 km

⁴ 100 ŝakuoj: ĉ. 30 metroj

⁵ Kurobane: ĝi signifas nigran plumon

tiun ĉevalon ĝis la loko, kie la ĉevalo haltos, kaj tiam lasu ĝin mem reveni.” Li pruntedonis al ni sian ĉevalon. Du malgrandaj infanoj kuris sopirante post la ĉevalon. Unu estis knabineto, kiu nomiĝis Kasane. Ne kutima nomo sonas ameme. Sora versis la sekvan hajkon.

La nom’ “Kasane”
devenas de diantoj
amaspetalaj.
(Sora)

Baldaŭ ni atingis iun vilaĝeton, kaj redonis la ĉevalon, liginte saketon da moneroj al ĝia selo.

Kurobane

Ni vizitis iun en la urbeto Jōbō-ji¹, kastelintendanton de Kurobane. La mastro tre ĝojis pro nia neatendita vizito, kaj daŭre paroladis tage kaj vespere. Lia pli juna frato, nomata Tōsui², servadis nin matene kaj vespere, kaj akompanis nin al sia domo. Ni estis invititaj eĉ de liaj parencoj. Tempo pasis. Iun tagon ni promenis ekster la urbeto kaj vidis restaĵon de Inu-ou-mono³, iris laŭ la kamparo de Nasu, kaj vizitis la malnovan tombon de feovulpino tamamo-no-mae. Post tio ni adorvizitis la sanktejon Hachiman-gū⁴. La fama pafarkisto Nasu-no-Yoichi⁵, celante al ventumilo, faris preĝon al ĉi tiu dio, dirante, “Mi aparte petas la dion Hachiman⁶ de mia hejmloko.” aŭdinte tion, despli mi sentis min forte impresita. Krepuskiĝis kaj mi revenis al la

¹ Jōbō-ji (ĵoobo-ĵi)

² Tōsui (toosui)

³ Inu-ou-mono: ĝi signifas ĉasi hundojn.

⁴ Hachiman-gū (haĉiman-guu)

⁵ Nasu-no-Yoichi (nasu-no-ĵoiĉi): 1169-1189 aŭ 1190, samurajo

⁶ Hachiman (haĉiman)

domo de s-ro tōsui. apude estas la templo Kōmyō-ji¹ por Shugendō².

Oni invitis nin tien, kaj mi adoris la kapeleton de la fondinto de shugendō.

Somera monto!

Adoris mi getaojn³,

je ekvojaĝo.

Ungan-ji⁴

Profunde malantaŭ la templo Ungan-ji en ĉi tiu regiono restis ruino de monta ermitejo de mia mentoro de zeno, la bonzo Butchō⁵.

Malvasta estas

la herba kabanaĉo.

Ĝin mi ne farus,

se ni ne havus tagojn

kun pluvo. Ja domaĝe!

Mi iam aŭdis de li mem ke tion li skribis sur la roko per pina karbo. Mi volis vidi tiun lokon kaj piediris al la templo Ungan-ji, apogante min per bastono. Oni propravole akompanis min. Multaj junuloj gajis laŭ la vojo, kaj do ni atingis montpiedon, dum mi ne rimarkis. La monto montriĝis profunda, pado laŭ valo daŭris tre longe, multaj pinoj kaj kriptomerioj staris nigre, muskoj estis malsekaj, kvankam nun en aprilo, estis ankoraŭ malvarme. Post vizito de dek plej pitoreskaj lokoj laŭ la vojo, transirinte ponteton, ni eniris la pordegon de la templo.

Do, kie troviĝas la ruino? Mi grimpis sur la malantaŭan monton, trovis etan

¹ Kōmyō-ji (koomjoo-ji)

² Shugendō (ŝugendo): montkulta religio sinkretisma kun budhismo

³ getaoj: japanaj lignaj sandaloj. En la kapeleto kultataj estas getaoj por monto-grimpado.

⁴ Ungan-ji (ungan-ji)

⁵ Butchō (buĉĉoo)

ermitejon sur roko ĉe kaverno. Ŝajnis al mi, ke mi vidus la ŝtonan ĉambbron kun la devizo “morta kaverno” de ĉina zenmajstro Myōzen-ĵi¹ kaj “ŝtona ĉambro” de ĉina bonzo Hōun², kiuj ambaŭ sidadis kun la decido ne eliri vivante de tie.

La ermitejon
en arbaret’ somera
ne bekas pigoj

Mi almetis la improvizite faritan verson sur la fosto.

Mortiga Ŝtono, ashino³

Post tio ni ekiris al Mortiga Ŝtono sesshō-seki⁴. La kastel-intendanto sendis nin per ĉevaloj. La grumo de mia ĉevalo petis min, doni al li mian vers-kartonon. Mi skribis por li, admirante, kian delikatan senton li havas.

Kukoloj pepas!
Ho, grumo, la ĉevalon
konduku tien!

La Mortiga Ŝtono kaŝas sin en ombro de la monto, kie fontas varma akvo. Ĉar veneneco el la ŝtono ankoraŭ ne malaperis, abeloj, papilioj kaj similaj morte kuŝis unu sur la alia tiel multe, ke ne videblas la koloro de sablo.

La saliko Yugyō-yanagi⁵ restas sur kamporando de rizejo en la vilaĝo ashino. Lia moŝto ia Kohō⁶, la guberniestro de ĉi tiu loko, ofte rekomendis min vidi ĉi tiun salikon.

¹ Myōzen-ĵi (mjoozen-ĵi): 1238-1395, ĉina zen-majstro

² Hōun (hooun): 467-529

³ ashino (aŝino)

⁴ sesshō-seki (seŝŝo-seki)

⁵ Yugyō-yanagi (jugjoo-janagi). Fama poeto-bonzo Saigyō (1118-1190) versis pri la saliko: “Kelktempe haltis/ mi en la salikombro/ sur la vojeto./ apude jen agrable/ susuras rivereto.”

⁶ Kohō (kohoo)

Do mi demandis min, kie ĝi estas. Hodiaŭ mi staris finfine sub la saliko.

En la rizkampo
plantinte iris foren
ĉiuj de l' salik'.

La bariero de Shirakawa¹

Tagoj pasis dum mia koro ankoraŭ ne estis klara. Tamen mia decido fiksiĝis, trapasinte la barieron de Shirakawa, la enirejon al la Nordo. Estas nature, ke unu antikvulo volis “iel ajn sendi leteron al la ĉefurbo” dum la trapaso. Ĉi tiu estas unu el tri famaj barieroj, kaj homoj kun poeta fajneco por senti venton, povis esti kortuŝita ĉi tie. Sub la impreso de antikvaj poemoj restus en oreloj aŭtuna vento kaj videblus ruĝaj, karmezinaj folioj, sed nun mi vidas branĉojn kun verdaj folioj. Ju pli grandaj iĝas niaj imagoj, des pli bela iĝas la pejzaĝo ĉirkaŭ la bariero. Floras ege blankaj deŭtzioj apud blankaj sovaĝaj rozoj. Ŝajnas, ke mi trapasus ĉi tiun barieron kvazaŭ en neĝado. Fujiwawara Kiyosuke² skribis, ke traironte la barieron, antikvuloj vestis sin belaj kaj ĝustigis kanĉapelon. Sora verkis jene:

Kun blanka floro
surkape, mi trairas
la barieron!
(Sora)

Sukagawa³

Tiel trapasinte, ni transiris la riveron abukuma. Maldekstresre alte staras la monto aizune, dekstre videblas la vilaĝoj Iwaki, Sōma⁴ kaj Miharu; ĉenas montoj lime de la

¹ Shirakawa (ŝirakaŭa)

² Fujiwara Kiyosuke (huĵiŭara kijosuke): 1104-1177, fakulo pri poetiko

³ Sukagawa (sukagaŭa)

⁴ Sōma (sooma)

regionoj Hitachi¹ kaj Shimotsuke². Ni iris laŭ la marĉo Kagenuma³, sed hodiaŭ pro nuba vetero, nenio bone speguliĝas. En la etapo de Sukagawa ni vizitis unu hajkiston, s-ron tōkyū⁴, kiu lasis nin resti ĉe li dum kvar-kvin tagoj. antaŭ ĉio li demandis min, “Kiel vi trapasis la barieron de Shirakawa?”⁵ Mi diris al li: “Elĉerpate fizike kaj spirite pro la longa vojaĝo, kaj elravite de belaj pejzaĝoj, rememorante korŝire malnovajn poetojn, mi ne povis sufiĉe bone elpensi propran verkon. Estus domaĝe transiri la barieron, nenion versinte. Do mi versis jene:

Unua kanto
en nordo estis ĥoro
por riz-priklado.

Tiam al la hajko aliaj alligis la sian, la duan kaj la trian. tiel kompletiĝis triopaj hajkoj.

Periferie de la staciurbeto loĝis bonzo ermita sub granda kaŝtanarbo. Ŝajnis al mi, ke tia estis la vivo preni hipokaŝtanajn glanojn.⁶ Mi priskribis sur la papero jene: “La ideogramo de kaŝtano konsistas el okcidento kaj arbo, kaj do ĝi havas rilaton kun la okcidenta paradizo.

tial, onidire, eĉ Bodisatvo Gyōki⁷ uzis la arbon por apogbastono kaj por fosto”.

Ho, malfacilas
rimarki kaŝtanflorojn
sub la markezo.

¹ Hitachi (hitaĉi)

² Shimotsuke (ŝimocuke)

³ Kagenuma: ĝi signifas spegulan lagon.

⁴ tōkyū (tookjuu), 1638-1715, konato de Bashō

⁵ La demando signifas “Kiun hajkon vi versis?”

⁶ temas pri la utao de Saigyō (1118-1190, fama utaisto-bonzo-samarajo), pri profunda monto.

⁷ Gyōki (gjooki): 668-749, altranga bonzo

La monteto Asaka-yama¹

Irinte ĉ. 5 leŭgojn² for de la domo de s-ro tōkyū, kaj trapasinte la etapon de Hihada, ni trovis la monteton asaka-yama, proksime de la ĉefvojo. Ĉi tie troviĝas multe da marĉoj. Jam tempas baldaŭ falĉi herbon, nomatan Katsumi³, kaj do mi demandis homojn, kiu herbo nomiĝas la floro Katsumi, sed neniu sciis. Dum mi serĉadis la marĉojn, mi demandadis, murmurante “Katsumi, Katsumi”, jam la suno estis subiranta trans la monteĝon. Ni turnis nin dekstren de la loko Nihonmatsu⁴, rigardis la kavernon de demono en Kurozuka, kaj tranoktis en la urbo Fukushima⁵.

La vilaĝo Shinobu⁶

En la sekva tago ni iris al la vilaĝo Shinobu por vidi ŝtonegon de shinobu-mojizuri⁷. En la fora vilaĝeto sub monto estas la ŝtono enterigita duone. Knabo el la vilaĝo diris al ni: “Ĝi estis iam sur la monto, sed scivolemaj vojaĝantoj, preninte hordeajn foliojn, provadis per ĝi por tinkturado kaj ofte pritemata en poezio ŝmiri la ŝtonegon. Vilaĝanoj malŝatis tion, kaj faligis ĝin suben ĉi tien, kaj do ĝi renversiĝis.” Estas domaĝe, ke tio povis okazi.

Knabinaj manoj
priklantaj! Tiaj iam
ornamis florojn.

¹ Asaka-yama (asaka-jama)

² 5 leŭgo: ĉ. 20 km

³ Katsumi (kacumi): *Zizania latifolia*

⁴ Nihonmatsu (nihonmacu)

⁵ Fukushima (Fukuŝima)

⁶ Shinobu (ŝinobu)

⁷ shinobu-mojizuri (ŝinobu-mojizuri): *Spiranthes sinensis* var. *amoena*, herbo uzata

Vestiĝo de Satō Shōji¹

Ni transiris la pramejon ĉe Tsukinowa² kaj alvenis al la etapa urbo Senoue. La vestiĝo de la provincestro Satō troviĝis ĉ. unu leŭgon kaj duonon³ maldekstre de la montopiedo. Mi aŭdis, ke la loko estas nomata “Sabano” de la vilaĝeto Iizuka. Mi paŝadis, ofte demandante, kaj fine atingis la monton nomatan Maruyama⁴. tie estas la vestiĝo de la domo de la provincestro. Mi ploris kun larmoj, kiam oni prezentis ruinojn de ĉefa pordego kaj aliajn. En la apuda malnova templo restas ŝtona monumento de la familio. Interalie kortuŝis min la signo de du edzinoj de la fratoj. Miaj larmoj malsekigis manikojn, ĉar iliaj nomoj fariĝis famaj, kiel virinoj fidele priservintaj al la edzoj. Ŝtona monumento, je kiu mi larmis, troviĝas ne malproksime sed nun antaŭ mi. Enirinte la templon, mi petis teon. tiam montriĝis, ke ĉi tie estas konservataj la glavo de Yoshitsune⁵ kaj la dorsokesto de Benkei⁶, kiel trezoroj.

Paperaj glavo
kaj kesto flirtu maje
en la ĉielo.

Tio okazis la unuan de majo⁷.

Iizuka⁸

Ĉi-nokte ni restis en la banloko Iizuka. Ĉar estis varma fonto, ni baniĝis kaj tranoktis en la gastejo, kiu tamen estis stranga mizera domaĉo kun pajlomato

¹ Satō Shōji (satoō ŝooĵi): samurajo en la 12a jarcento, servanta al Yoshitsune

² Tsukinowa (cukinoŭa)

³ unu leŭgo kaj duono: ĉ. 6 km

⁴ Maruyama (marujama)

⁵ Yoshitsune (joŝicune): MINaMoto-no-Yoshitsune (1159-1189), fama samurajo

⁶ Benkei: Musashiboō Benkei, 1155-1189, samurajo servanta al Yoshitsune.

⁷ la unua de majo: la 17a de junio laŭ la nuna kalendaro

⁸ Iizuka: Bashō erare skribis. La loko estis “Iizaka”

sternita sur terplanko. Sen ajna lanterno ni kuŝiĝis sur pajlomato, kiun ni mem pretigis ĉe la fornejo kun fajreto. Kiam noktiĝis, subite tondris kaj pluvegis senĉese, pluvoakvo likadis sur nin, kuŝantajn, kaj krome pikite de puloj kaj moskitoj, ni ne povis bone dormi. Pro reaperinta kronika malsano, mi apenaŭ svenis. Fine lumiĝis la ĉielo post la mallonga nokto; ni ekiris la vojon. Malvigla mi estis pro la lasta nokto. Pruntepreninte ĉevalojn, ni rajdis al la stacio de Koori. La vojo restas ankoraŭ tre longa, kaj tia malsano malcertigis mian vojaĝon. Sed strebante pilgriman vojaĝon al malproksimaj regionoj, penetrite de vanteco kaj pretigante min forĵeti, liverante ĉion al la ĉiela ordono ĉu morti sur la vojo aŭ ne, mi iomete revigliĝis kaj pli kuraĝe antaŭenpaŝis laŭ la vojo, kaj trairis la grandan barieron de Date.

Kasashima¹

Trapasinte tra mallarĝa vojeto de abumizuri, kaj preteririnte la kastelon de Shiroishi², ni eniris en la distrikton de Kasashima. Mi demandis, kie troviĝas la tombo de vicgeneralo Sanekata. oni respondis: “La montopieda vilaĝo, kiu estas videbla dekstre fore de ĉi tie, nomiĝas Minowa-Kasashima³. Nun restas la sanktejo de vojodio kaj kreskas miskantoj kiel memoraĵo. ” Vojo fariĝis aĉa pro lastatempa maja pluvado kaj krome mi laciĝis je korpo. tial ni preterpasis ĝin, nur vidante de malproksime, sed mi faris verson jenan, ĉar mi venis ĉi tien, al Minowa -Kasashima ĝuste en maja pluvsezono.

Ho, kie estas

Kasashima? Mi paŝas

en koto maja.

¹ Kasashima (kasaŝima)

² Shiroishi (ŝiroiŝi)

³ Minowa-Kasashima (minoŭa-kasaŝima)

Pino de takekuma

Ni tranoktis en Iwanuma¹.

Okulfrapa estis la pino en takekuma. De la tero el unu radiko dividiĝis du pinarboj. Montriĝis, ke ĝi ne perdis tian formon, kia estis antaŭe. antaŭ ĉio mi rememoris pri la bonzo-poeto Nōin²: iu gubeniestro, enoficigita en la provinco Mutsu³, forhakis ĉi tiun pinon kaj uzis ĝin kiel ponto-palison trans la rivero Natori. Mi aŭdis, ke de generacioj al generacioj oni aŭ forhakis aŭ plantis la arbon. tial nun ĝi havas tiel admirindan jarmilan formon. Kyohaku⁴, mia disĉiplo, iam sendis al mi jenan version donace al la vojaĝo.

Sakur malfrua!
al l' majstro montru pinon
en takekuma.

Jen mi respondis,
Ni, post sakuro,
dutrunkan pinon vidis
post tri monatoj.

Sendai

Ni transiris la riveron Natori kaj eniris en la urbon Sendai. Tio estas en la tago ornami antaŭtegmenton per iridoj. Ni serĉis loĝejon kaj restis dum 4-5 tagoj. Ĉi tie loĝas unu pentristo nomata Kaemon. Mi aŭdas, ke li estas klerulo, kaj do mi konatiĝis kun li. Iun tagon li ĉiĉeronis nin. Li diris, ke li longe esploris vidindejojn, ne konatajn poeziajn lokojn. Kreskis multe da lespedezaj arbustoj en la kampo de

¹ Iwanuma (iŭanuma)

² Nōin (nooin): 988-1050 aŭ -1058, bonzo-utaisto

³ Mutsu (mucu)

⁴ Kyohaku (kjohaku): ?-1696, hajkisto

Miyagino¹. Do mi imagis aŭtunan pejzaĝon. Nun estas tempo kun floroj de asebio sur montetoj tamada, Yokono² kaj Tsutsuji-ga-oka³. Ni eniris en la pinarbaron, kien eĉ ne penetris lumo. La loko estas nomata Konoshita⁴. Ĉar ankaŭ en malnova tempo rosis tiel multe kiel nun, oni versis antikve, “Servisto, ombrelon al la Sinjoro!” Ni adorvizitis la templon Yakushi⁵, la sanktejon Tenjin⁶. Krepuskiĝis. La pentristo donacis al mi memfaritajn desegnaĵojn de kelkaj lokoj en Matsushima⁷ kaj Shiogama⁸. Li donis al ni ĉe adiaŭo ankaŭ du parojn da zorioj kun malhelbluaj laĉoj iridkoloraj. tiaj mirindaj donacaĵoj ja montris lian fajnan klorecon.

Iridojn ligu
mi al zorioj. Samas
kolor’ al laĉoj!

Monumeto sur la vazo

Laŭ la krokizita mapo ni iris laŭ streta vojo al fora interno. Ĉe montpiedo kreskas kareksoj nomata Tohu-no-suge⁹. Mi aŭdis, ke eĉ nun ĉiujare oni faras kareksajn matojn kaj tributas al guberniestro.

La ŝtona monumento “Tsubo-no-Ishibumi¹⁰” troviĝas sur la ruino de la kastelo de

¹ Miyagino (mijagino)

² Yokono (jokono)

³ Tsutsuji-ga-oka (cucuĵi-ga-oka)

⁴ Konoshita (konoŝita)

⁵ Yakushi (jakuŝi)

⁶ Tenjin (tenĵin)

⁷ Matsushima (macuŝima)

⁸ Shiogama (ŝiogama)

⁹ Tohu-no-suge: karekso uzita por junkomato kun 10 strioj da maŝoj

¹⁰ Tsubo-no-Ishibumi (cubo-no-iŝibumi)

taga en la vilaĝo Ichikawa¹.

La monumento estas 6 ŝakuojn² alta kaj 3 ŝakuojn³ larĝa. Muskokovrite, literoj estas apenaŭ legeblaj. Skribita estas distanco ĝis landlimoj al kvar direktoj. Estas ankaŭ lapidarigitaj vortoj: “Ĉi tiu kastelo estas fondita de la generalo Ōno-no-ason-Azumabito⁴, en la unua jaro de jinki⁵. Ĝin restaŭris kancelariano Emi-no-ason-Asakari⁶, generalo-gubernatoro de orientaj maroj kaj montoj, en la unua de decembro en la 6a jaro de tenpyō-hōji⁷“. Tio estis la tempo de la tennoo Shōmu⁸. Kvankam lokaj nomoj en poezioj estas multe transdiritaj de antikva tempo, tamen tero de montoj falis, riveroj fluis, vojoj ŝanĝiĝis, ŝtonoj enteriĝis kaj kaŝiĝis sub la teron, arboj kadukiĝis kaj anstataŭiĝis per arbidoj. tempo pasis, novaj homoj naskiĝis kaj preskaŭ ĉiuj ruinoj de lokoj fariĝis ne konataj, sed ĉi tie troviĝas la nedubebla atesto miljara kaj nun per siaj okuloj oni povas ekscii koron de antikvuloj. tio estas graco dank’ al pilgrimado kaj ĝojo de la vivo. Forgesinte penigan vojaĝon, mi larmojn faligis.

¹ Ichikawa (iĉikaŭa)

² 6 ŝakuoj: ĉ. 180 cm

³ 3 ŝakuoj: ĉ. 90 cm

⁴ Ōno-no-ason-Azumabito (oono-no-ason-azumabito): ? -742, samurajo sub ŝoguno

⁵ la unua jaro de jinki (jinki): 724 p.K.

⁶ Emi-no-ason Asakari: ?-7646

⁷ la unua de decembro en la 6a jaro de tenpyō-hōji: la 20a de decembro 762 laŭ lanuna kalendaro

⁸ la tennoo Shōmu (ŝoomu): 701-756

Sue-no-matsuyama¹

Poste mi vizitis la riveron Noda-no-Tamagawa² kaj la ŝtonon Okinoishi³. En Sue-no-Matsuyama, oni fondis la templon, nomatan Matsushō-zan⁴. Ĉie inter pinarboj troviĝas tombejoj. al mi estas ege triste, ke tia devas esti la fina sorto de amrilatoj, kunjurintaj eternan nedisigeblan parecon, kvazaŭ paron da birdoj kun respektive nur unu flugilo, aŭ du branĉoj alligitaj radike. Ĝuste tiam mi ekaŭdis vesperan sonorilon en la golfo de Shiogama⁵. Iomete sereniĝis la ĉielo post maja pluvado, videblas svage vespera luno kaj proksime la insulo Magaki. Fiŝistoj remas boatojn, kune reirante hejmen, kaj laŭtvoĉe disdividas kaptaĵojn. Mi komprenis signifon de la malnova poezio, kiu kantis “Kortuŝas ŝnuro altiranta boaton rematan en la golfo de Shiogama”, kaj des pli emociata mi estis. Ĉi-nokte blinda bonzo-menestrelo ludis bivo-liuton kaj rakontante kantis balado-ĵoruron de la provinco oku. Ĉi tio estas malsama de La rakontoj pri Heike⁶, kaj ne estas danco. Li kantis kun rureska tono kaj tio iomete bruis al miaj oreloj, sed ĝi ŝajnis al mi tre laŭdinda, ne lasante la tradicion de la provinco.

La sanktejo Shiogama⁷

Frumatene ni adorvizitis la sanktejon Myōjin⁸ en la urbo Shiogama. Granda feŭdestro, DatE Masamune⁹, rekonstruis ĝin, kaj do kolonoj estas dikaj, kolorigitaj

¹ Sue-no-Matsuyama (sue-no-macujama)

² Noda-no-Tamagawa (noda-no-tamagaŭa)

³ Oki-no-Ishi (oki-no-iŝi)

⁴ Matsushō-zan (macuŝoo-zan)

⁵ Shiogama (ŝiogama)

⁶ La rakontoj de Heike: Heike-Monogatari, japane

⁷ Shiogama (ŝiogama)

⁸ Myōjin (mjooĵin)o

⁹ Date Masamune: 1567-1636, daimio

ĉevronoj estas brilegaj, ŝtonaj ŝtuparoj estas alte metitaj unu sur la alia, kaj matena suno briligas vermiljonan sanktan barilon. Ĝis la fino de la vojo, ĝis la limo al la malpura lando gardas nin ĉiam la sankta spirito. tia kredo estas la moro de nia lando. Ha, kiel kara tio estas! Fronte de la sanktejo staras malnova lanterno. Sur ĝia fera surfaco estas skribite: “En la 3a jaro de bunji¹ oferdonacis Izumi-no-Saburō².” tio nun prezentas al mi ĝian bildon antaŭ 500 jaroj. tio ekstreme emociis min. Li estis homo brava, justama kaj fidela al la mastro kaj obeema al la gepatroj. Ĝis nun oni ne devas ne respekti lian honorindan nomon. Vere estas dirite: “oni devas fidele sekvi la vojon kaj teni la justecon. tiam ankaŭ fameco sekvas.” Jam proksimas al la tagmezo. Pruntepreninte boaton, ni veturis al la insuloj Matsushima³. La distanco estas 2 leŭgoj⁴; ni atingis rifozaŭ bordon de la insulo Ojima⁵.

Matsushima

Nu, estas dirite multe pri Matsushima, kaj ĝia pejzaĝo ja estas la plej bela en Japanio, neniom cede al ĉinaj pejzaĝoj de la lagoj Tōtei⁶ kaj Seiko⁷. El sudoriento sterniĝas maro, interne de la golfo en 3 leŭgoj⁸ svarmas tajdo, kvazaŭ la ĉina rivero en la provinco Sekkō⁹. Troviĝas multaj diversaj insuloj: iuj altaj turnas sin al la ĉielo, kaj aliaj malaltaj kuŝas sur ondoj. Ŝajnas ke iuj insuloj troviĝas duoble surmetitaj, aliaj trioble; iu disigita maldekstre kaj alia kunmetita dekstre; iu portas surdorse

¹ la 3a jaro de bunji (bunji): 1187 p.K.

² Izumi-no-Saburō (saburoo): Huijwara (Huijūara)-no-Tadahira (1167-1189)

³ Matsushima (macuŝima)

⁴ 2 leŭgoj: ĉ. 8 km

⁵ Ojima (ojima)

⁶ Tōtei (tootei): la lago Dongting en Ĉinio

⁷ Seiko: la lago Xihu en Ĉinio

⁸ 3 leŭgoj: ĉ. 12 km

⁹ la provinco Sekkō (sekkoo): ĉina provinco zhejiang

alian, kaj iu brakumas alian en sia sino; kvazaŭ homoj karesas siajn infanojn kaj nepojn. Delikata estas verdo de la pinarboj, kies branĉoj kaj folioj estas kurbigitaj de vento el maro, kvazaŭ kurbigitaj arte de homaj manoj. La aspekto estas alloga kiel vizaĝo de belulino. Ŝajnas al mi, ke tion kreis la monta dio Ōyamazumi¹ en japana mitologio. Kiu povus esprimi per penikoj kaj vortoj la kreaĵon de ĉiela artisto?

La strando de la insulo Ojima² estas ligita al la ĉefa tero. Tie restas ruino de aparta kabano kaj roko sur kiu sidante kontempladis zen-majstro Ungo³. Eĉ nun, kvankam malofte, sub pinarboj loĝas trankvile ermitoj en kabano, kuirante malriĉan mangĉaĵon per fajro el pinkonusoj.

Ne sciante, kiaj estis ili, sed allogite, mi alvenis al ili. Nokte la pejzaĝo transformiĝis tute alia ol tage, kaj la luno reflektata sur la maro brile ludas. reveninte al la marbordo, ni trovis gastejon, kiu havis du etaĝojn kun fenestroj rigarde al la maro. tie mi kuŝis en la naturo kun vento kaj nuboj, kaj ĝuis mirindan, la plej misteran senton.

Sora versis:

Ho, Matsushima⁴!

Kukoloj kukuantaj

gruforme flugu!

Mi ĉesis paroli kaj penadis ekdormi, sed ne povis. Kiam mi foriris de mia lasta ermitejo, s-ro Sodō⁵ versis ĉine poezion pri Matsushima kaj ankaŭ s-ro Hara Anteki⁶ donacis al mi utaon pri Matsu-ga-Urashima⁷.

¹ Ōyamazumi (oojamazumi)

² Ojima (ojima)

³ Ungo: 1582-1658

⁴ Matsushima (macuŝima)

⁵ Sodō (sodoo): 1642-1716, hajkisto

⁶ Hara anteki: disĉiplo de Bashō

⁷ Matsu-ga-urashima (macu-ga-uraŝima)

Ĉi-nokte, elpreninte ilin el mia sako, mi igis ilin akompanantaj amikoj. Estis ankaŭ komenca parto de utaoj fare de s-roj Sampū¹ kaj Jokushi², miaj disĉiploj.

La templo Zuigan-ji³

En la 11a de majo⁴, ni vizitis la templon Zuigan-ji. Ĉi tiu templo havas jam 32 generaciojn de ĉefbonzoj. Ĝi estis fondita de Makabeno-Heishirō⁵, kiu, bonziĝinte, iris al Ĉinio. revenite hejmlanden, li malfermis la templon. Poste dank' al virta penado de zen-majstro ungo estis rekonstruitaj sep haloj kun tegolitaĵoj, kun oraj muroj kaj ornamoj brilantaj. Ĝi fariĝis grandega templo por realigi paradizon de budhana mondo. Mi sopire pensis, kie do staris la templo de la sanktulo Kenbutsu-hijiri⁶ profunde adorita de Saigyō⁷.

Ishinomaki⁸

En la 12a tago⁹ ni celis la urbon Hiraizumi. Mi aŭdis, ke survoje troviĝas pinarboj en aneja kaj la ponto de odae, famaj en poezioj. Sed ĉar malofte paŝis homoj, ni devis iri necertan vojon laŭ padoj por ĉasistoj, falĉistoj kaj hakistoj. Fine ni perdis vojon kaj atingis la havenon nomatan Ishinomaki. Videblis sur maro la monto Kinka¹⁰,

¹ Sampū (sampoo): 1647-1732, disĉiplo kaj mecenato de Bashō

² Jokushi (jokuŝi): disĉiplo de Bashō

³ Zuigan-ji (zuigan-ĵi)

⁴ la 11a de majo: la 27a de junio laŭ la nuna kalendaro

⁵ MaKaBE-no-Heishirō (makabe-no-heiŝiroo): 1189-1274)

⁶ Kenbutsu-hijiri (kenbucu-hijiri): altranga bonzo, kiu trejni sin en la insulo Ojima (ojima) dum 12 jaroj en la 12a jarcento

⁷ Saigyō (saigoo): 1118-1190, samurajo, bonzo, utaisto

⁸ Ishinomaki (iŝinomaki)

⁹ en ka 12a tago: en la 28a de junio laŭ la nuna kalendaro

¹⁰ Kinka: Ĝi signifas oran floron

laŭdita iam en poezio de Ōtomo-no-Yakamochi¹ “Floras oraj floroj”. Kelkaj centoj da kargoboatoj amasiĝis en la golfo; sur la tero dense troviĝas domoj; leviĝadas fumo el la kamentuboj. Hazarde ni alvenis al la loko, kien ni ne planis. Kvankam ni volis lui ĉambron en gastejo, tamen neniu luigis ĝin. Apenaŭ ni povis tranokti en mizera dometaĉo kaj frue en la sekva mateno ekiris malcerte laŭ nekonata vojo. Ni iris laŭ la longa digo de la rivero Kitakami, preter pramejo de Sode, paŝtejo de obuchi² (obuĉi), herbejo de fragmitoj en Mano kaj aliaj lokoj famaj en poezioj. Ni plu randiris maltrankvile laŭ la oblonga streta marĉo Naganuma kaj loĝis unu nokton en la loko nomata toima. Fine ni atingis la urbon Hiraizumi. al mi ŝajnas, ke ni trairis 20 leŭgojn³ kaj iom pli.

Hiraizumi

La gloro dum tri generacioj lumis nur momente kvazaŭ en daŭro de unu dormo. La ruino de la granda pordego staras je unu leŭgo⁴ antaŭ la kastelo. La domo de Hidehira⁵ tute malaperis kaj ŝanĝiĝis en kampon. restas nur ruino de la monteto Kinkei⁶-zan, arte farita en la formo de Fuĵi-monto. unue mi supreniris al takadachi⁷, de kie videblas la rivero Kitakami, la granda rivero fluanta el la distrikto Nambu. La flanko de la rivero Koromo fluas ĉirkaŭ la Kastelo de Izumi kaj ĵetas sin en la grandan riveron sub takadachi. La ruino de la kastelo de Yasuhira⁸ estas sur la alia flanko

¹ Ōtomo-no-Yakamochi (ootomo-no-jakamoĉi)

² Obuchi (obuĉi)

³ 20 leŭgoj: ĉ. 80km

⁴ unu leŭgo: ĉ. 4 km

⁵ Hidehira: Fujiwara-no-Hidehira (huĵiŭara-no-hidehira) 1122-1187, samurajo, generalo potenca

⁶ Kinkei: ĝi signifas oran kokon)

⁷ takadachi (takadaĉi): iama loĝejo de Yoshitsune (joŝicune)

⁸ Yasuhira (jasuhira): ?-1189, filo de Hidehira

de la bariero de Koromo. tio, ŝajne, gardis la enirejon de Nambu kontraŭ ainoj. Elitaj fideluloj de Yoshitsune¹ kolektiĝis en ĉi tiu kastelo por sin lumigi en la lasta momento, kaj tamen ĉio ŝanĝiĝis en herbaron. “Ŝtato pereis, tamen restas montoj kaj riveroj; la ruino de la kastelo en printempo estas amase kovrita de herboj kaj arboj.” Metinte kanĉapelon sur herbon, mi ploris kun larmoj tiel longe, ke horoj pasis sen mia konscio.

Someraj herboj!
Jen sekvo de la revoj
de batalintoj.

Deŭtziaj floroj
ja blankas kiel harar’
de Kanehusa².
(Sora)

Du haloj, pri kiuj mi kun admiro aŭdis antaŭ longe, estas malfermitaj. En Kyō-dō³ restas statuoj de tri protektaj budhoj, kaj en Hikaridō⁴ estas ĉerkoj de la generaloj en tri generacioj⁵ kaj tie estas instalitaj ankaŭ tri statuoj de budho. Jam perdiĝis sep trezoroj, per vento rompiĝis la pordo iam inkrustita per juveloj, putris pro prujno kaj neĝo la kolonoj ore plakitaj. tie jam frue defalus domoj, dense kreskus herboj kaj regus vento. Sed ĉirkaŭita per novaj muroj en ĉiuj flankoj, kaj tegita per tegoloj kontraŭ vento kaj pluvo, ĝi portempe restas kiel la historia memoraĵo.

Ĉu maja pluvo

¹ Yoshitsune (joŝicune): MINaMoto-no-Yoshitsune, 1159-1189, pli juna frato de Minamoto-no-Yoritomo (joritomo)

² Kanehusa: fikcia samurajo en Gikeiki (rakontoj pri Yoshitsune)

³ Kyō-dō (kjoodoo): halo de sutroj

⁴ Hikari-dō (hikari-doo): luma halo

⁵ tri generacioj: Fujiwara-no-Kiyohira, -Motohira, -Hidehira

evitis Luman Halon?

Ĝi brilas bele!

La bariero de Shitomae¹

Nur rigardante fore la vojon norde al Nambu, ni tranoktis en la vilaĝo de Iwade². Ni strebis atingi la distrikton Dewa³, trairinte tra oguro-zaki kaj Mizuno-ojima⁴, kaj poste irante de la varma fonto Narugo ĝis la bariero de Shitomae. Ĉar laŭ ĉi tiu vojo malofte iras vojaĝantoj, la intendanto ege suspektis nin, kaj ni apenaŭ sukcesis trapasi la barieron. Kiam ni supreniris grandan monton, jam krepuskiĝis. Ni trovis domon de gardisto kaj petis lin gastigi nin. Ni devis malgraŭvole resti ĉi tie en la monto dum tri tagoj, ĉar ventegis kaj pluvegis.

Pedikoj, puloj!

aŭdiĝas al ni, ke ja

ĉevalo pisas!

La mastro de la domo diris, ke por trapasi plue ni petu gvidanton, ĉar pado ne estas certa de ĉi tie ĝis la distrikto Dewa tra granda monto. Do ni serĉis homon. La fortikega junulo kun cimitaro kaj kverko-bastono antaŭiris nin. timante, ke ja hodiaŭ ni nepre renkontus danĝeron, ni sekvis lin. Ĝuste kiel diris la mastro, dense amase kreskas arboj en alta monto kaj aŭdiĝas neniu pepado de birdoj. Sub arboj, ombroriĉe kreskantaj, mallumas, kvazaŭ ni irus nokte. Mi sentis, kvazaŭ tereroj falas de nubaj randoj. Ni pene paŝadis laŭ etbambua densejo distretante herbojn, travadis rojojn, stumbladis sur ŝtonoj kaj tute ŝvitis malvarme. Finfine ni atingis la vilaĝon Mogami. Nia gvidinto diris: “Laŭ ĉi tiu pado ĉiam nepre okazas io malbona.

¹ Shitomae (ŝitomae)

² Iwade (iŭade)

³ Dewa (deŭa)

⁴ Mizuno-ojima (mizuno-ojima)

Mi estas feliĉa, ke mi povis akompani sen iu ajn akcidento.” Ni disiĝis ĝoje. aŭdintion eĉ refoje poste, mi havis fortan korbato.

Obanazawa¹

En la urbo obanazawa mi vizitis homon nomatan Seihū². Kvankam li estas riĉulo, lia vivocelo ne estas malnobla. Li ofte vizitas la ĉefurbon kaj bone scias koron de vojaĝantoj. tial li, gastigante nin ĉe si dum kelke da tagoj, konsolis nian laciĝon post longa vojaĝo kaj prizorgis nin multe per diversaj regaloj.

Por refreŝiĝo
ni gastas tre agrable
ja kvazaŭ hejme.

Elrampu, bufo,
de sub la silkraŭpejo:
kvakejo cia!

Kartumaj floroj!
Imagas mi pri brosoj
aranĝi brovojn.

Jen, silkraŭpistoj
laboras en kostumo
ja antikveca!
(Sora)

¹ Obanazawa (obanazaŭa)

² Seihū (seihuu): Suzuki Seihū, 1651-1721, komercisto-hajkisto

La monta templo Ryūshaku-ji¹

En la provinco de Yamagata² troviĝas la monta templo nomata ryūshaku-ji. Fondis ĝin granda majstro Jikaku³, kaj la loko estas aparte pura kaj kvieta. Ĉar oni rekomendis min viziti ĝin, mi ŝanĝis vojon de obanazawa, iris tien je 7 leŭgoj⁴. ankoraŭ ne krepuskiĝis. Ni luis antaŭe pilgriman loĝejon ĉe la piedo de monto kaj supreniris al la templo sur la monto. Sur amasiĝintaj rokoj staras la monto, kaj kreskas malnovaj pinoj kaj kverkoj. oldaj estas la grundo kaj ŝtonoj glate kovritaj de muskoj. Fermitaj estas la pordoj de ĉiuj adorejoj sur rokoj, kaj aŭdiĝas nenia bruo. Laŭirante krutegaĵon, rampante sur rokoj, adorante la templon, ĉirkaŭate de bela pejzaĝo kaj kvieteco, mi eksentis min trankviliĝanta je la koro.

Ho, kvieteco!

Penetras ja en rokojn

cikada trilo.

La rivero Mogami

Por ŝipveturi laŭ la rivero Mogami ni atendis ĉe la havenurbeto Ōishida⁵ bonan veteron. Ĉi tie la hajko estis semita jam antaŭ longe, kaj do oni pene serĉas vojon de hajkoj, sopirante la pasintecon de neforgeseblaj floroj, konsolante sin je la koro per eŭfonio de ŝalmo kaj de korno, kaj tamen fine perdis direkton inter la du vojoj, la malnova kaj la nova. Ĉar estis neniu gvidanto, mi kompletigis unu modestan hajkan ĉenon. tio estis la estetika apogeo de la vojaĝo.

¹ Ryūshaku-ji (rjuuŝaku-ĵi)

² Yamagata (jamagata)

³ Jikaku (ĵikaku): 794-864, alinome Ennin, bonzo, kiu vojaĝis al Ĉinio (siatempe tang-Dinastio) en 838.

⁴ 7 leŭgoj: ĉ. 28 km

⁵ Ōishida (ooiŝida)

La rivero Mogami havas sian fonton en Michinoku¹ kun sia supra fluo en Yamagata². Laŭ la rivero estas terure danĝeraj lokoj nomataj Goten³, Hayabusa⁴. Ĝi fluas norde de la monto Itajiki⁵, kaj fine eniras en la maron ĉe Sakata. Montoj kovras dekstran kaj maldekstran bordojn, kaj boatoj iras inter arbetoj. Boaton ŝarĝitan per rizo oni nomas probable “rizboato”. akvofalo nomata Shiraito⁶ falas tra ĉiuj spacoj inter verdaj folioj, kaj sur la rivera bordo staras la templo Sennin-dō⁷.

La boato riske veturis sur ŝvelanta akvo.

Torrente fluas
rivero Mogami post
pluvado maja.

Tri montoj de Dewa⁸

En la 3a de junio⁹ mi supreniris la monton Haguro. Mi vizitis hajkiston de mia skolo, s-ron Zushi Sakichi¹⁰ kaj ricevis aŭdiencon ĉe lia moŝto Egaku ajari¹¹. Li loĝigis min en la branĉa templo sur mezdekklivo Minami-dani kaj akceptis nin kun delikata kompatato.

¹ Michinoku (miĉinoku): suda parto de Nord-orienta Provinco

² Yamagata (jamagata)

³ Goten: ŝtonoj de go-ludoj

⁴ Hayabusa (hajabusa): falko

⁵ Itajiki (itaĵiki)

⁶ Shiraito (ŝiraito): ĝi signifas blankajn fadenojn.

⁷ Sennin-doo (sennindoo): ĝi kultas Kaizon, subulon de Yoshitsune.

⁸ Dewa (deŭa)

⁹ la 3a de junio: la 19a de julio laŭ la nuna kalendaro

¹⁰ Zushi Sakichi (zuŝi sakiĉi): tinkturisto-hajkisto

¹¹ ajari (aĵari): bonzo-ŝintoisto

La 4an, en la ĉefa halo oni organizis kunsidon por hajkoj.

Miraklon benu!

Bonodorigas neĝon

Minami-dani.

En la 5a, ni adorvizitis la sanktejon Gongen. oni ne scias, en kiu epoko vivis la mastro Nōjo-daishi¹, la fondinto de la templo. En la libro Engishiki² ĝi estas notita: “Sanktejo de ushū-satoyama³”. Ideogramoj de “satoyama” kaj “nigro” estas similaj, kaj do povas esti, ke oni skribis erare. La nomo de Haguro⁴ povus deveni de mallongigo de “Nigra monto en la distrikto Plumo”. toponimio de “Dewa⁵”, onidire, originas de enskribo en la antikva libro Fudoki: “oni oferas birdajn plumojn kiel tributaĵon de la distrikto”. La monto Haguro kune kun Gassan⁶ kaj Yudono⁷ konsistigas triopajn Sanktajn Montojn en Dewa. Ĉi tiu templo apartenas al la ĉefa templo Edo-tōeizan⁸, kaj ĝi tenas la torĉon de budheco por rapida luminiĝo per koncentrata meditado-introspekto kvazaŭ lumklara luno laŭ la instruo de tendai-Skolo de Budhismo. Vice staras bonz-loĝejoj, kie oni helpas asketadon de ŝugendo⁹, kaj oni kun humileco respektas miraklan efikon de la sankta monto kaj la sankta loko. Prosperu por ĉiam, verdire, admirinda monto!

¹ Nōjo-daishi (nooĵo-daiŝi): 562-641, la 3a filo de la tennoo Sushun (suŝun)

² Engishiki (engiŝiki): libro pri juroj kaj kutimoj verkita en 927

³ Ushū-satoyama (uŝuu-satojama): monteto en la distrikto ushū

⁴ Haguro: ĝi signifas nigran plumon.

⁵ Dewa (deŭa): ĝi signifas “oferi plumon”.

⁶ Gassan: ĝi signifas lunan monton.

⁷ Yudono (judono): nomo de la monto. La nomo signifas banejon.

⁸ Tōeizan (tooeizan)

⁹ ŝugendo: religia ekzercado en monto

En la 8a tago¹, ni supreniris la monton Gassan. Ĉirkaŭinte nian kolon per kolieroj el ŝnuroj de noditaj brusonetiaj paperoj, kovrinte la kapon per krono de blanka katuno, kondukate de forta gvidanto, nomata gōriki², ni iris supren je 8 leŭgoj³ laŭ glacio kaj neĝo en nebula monto. Mi timis, kvazaŭ mi enirus en la nebulan barieron de la vojo al la suno kaj la luno. anhelante kaj frostiĝante, mi atingis la pinton, kiam subiris la suno kaj aperis la luno. Ni sternis etbambuojn kiel matracojn kaj igis bambuan trunkon kapkuseno. Kuŝante ni atendis elkrepuskiĝon. Kiam la suno aperis kaj nebulo malaperis, ni iris suben al Yudono⁴.

Ĉe la valo staris forĝejeto. En la distrikto oni elektis sanktan akvon por forĝado. Ĉi tie forĝistoj, puriginte sin, hardigis glavojn, kiuj gravurite per la nomo Gassan, estas laŭdataj tra la mondo. Venis al mi en la kapon malnova ĉina historio, en kiu estas skribite pri glavoforĝisto Ganjiang kun lia edzino Moye⁵, ke li hardigadis glavojn per la Drak-Fonta akvo. Ĉi tio ja komprenigis min, ke la spirito de fakuloj kaj la diligenta persisteco de lertuloj ja ne estas malprofundaj. Dum mi sidis sur la roko kaj iomete ripozis, mi trovis duone malfermitajn burĝonojn de sakuro 3 ŝakuojn⁶ alta. Laŭdinda estas ja la koro de sakuro, kies radiko estante sub neĝtavolo, tamen ne forgesante printempon, ekfloras kvankam malfrue. tio estas miraklo, kvazaŭ eĉ sub arda ĉielo bonodorus floroj de mirobalano. Mi rememoris nun poezion de ĉefbonzo Gyōson⁷. Des pli forte mi sentis tion. Laŭ morala leĝo de asketoj, ĝenerale estas malpermesite malkaŝi detalojn pri la monto. Do mi pri tio ne skribos plue. reveninte

¹ la 8a tago: la 24a de julio laŭ la nuna kalendaro

² gōriki (gooriki)

³ 8 leŭgoj: ĉ. 32 km

⁴ Yudono (judono): nomo de la monto. La nomo signifas banejon.

⁵ Moye (moje)

⁶ 3 ŝakuoj: ĉ. 90 cm

⁷ Gyōson (gjooson): 1055-1135, bonzo-utaisto

al dormejo en la templo, mi skribis en kartonoj hajkojn de pilgrimo al la triopaj Sanktaj Montoj laŭ la peto de Egaku-ajari¹.

Ho, kiel freŝe!
Jen lunarketo super
la mont' Haguro.

Amase nuboj
eriĝis! Nun videblas
la luna monto.

Ne parolata
mistero de Yudono!
Aperas larmoj.

Yudono-monto!
Monerojn tretas homoj
kortuŝe, larme.
(Sora)

Sakata

Ni lasis la lokon Haguro kaj iris al la kastela urbo tsurugaoka². Nin akceptis samurajo-vasalo nomata Nagayama Shigeyuki³, ĉe kiu okazis kunsido de hajkoj. Mi verkis unu hajkan ĉenon. Ĝis tiam ankaŭ Sakichi⁴ akompanis nin. Laŭ la rivero per barko ni veturis al la haveno de la urbo Sakata. tie ni loĝis ĉe la kuracisto nomata

¹ ajari (ajari)

² Tsurugaoka (curugaoka)

³ Nagayama Shigeyuki (nagajama ŝigejuki): disĉiplo de Bashō

⁴ Sakichi (sakiĉi): parenco de NaGaYaMa Shigeyuki

En'an Huggyoku¹.

Vespere Monto

Atsumi² ĝuas vidon

al Hukuura.

Varmegan tagon

forportis en la maron

rivero Mogami.

Kisakata

Traĝuinte belajn pejzaĝojn de la maro, montoj, riveroj kaj distriktoj, nun mi dediĉas mian atenton al pitoreska vidaĵo de Kisakata. Nordorienten de la haveno de Sakata, transpaŝinte monton, irinte laŭ rifa bordo kaj plaĝo, je distanco de ĉ. 10 leŭgoj³ ni atingis tien, kiam la suno estis subironta. Vento de la maro supren levas sablerojn, kaj la monto Chōkai⁴ kaŝiĝis en pluvnebulon. Mi apreziis mirindecon de eĉ pluvado en la mallumo kaj esperis belan kaj serenan vidon post pluvado. Ni eniris en fiŝistan kabaneton kaj atendis bonan veteron. La sekvan matenon la ĉielo bone sereniĝis kaj la matena suno pompe leviĝis. Ni do ekveturis per boato en la golfo de Kisakata. Antaŭ ĉio ni direktis la boaton al la insulo Nōin⁵ kaj vizitis ruinon de la ermitejo, kie kviete loĝis la bonzo Nōin dum tri jaroj. Poste ni surbordiĝis al alia bordo, kie ankoraŭ restis malnova sakuro-arbo, memore al la utaoj de la bonzo

¹ En'an Huggyoku (en'an hugjoku): kuracisto, disĉiplo de Bashō)

² Atsumi (acumi)

³ 10 leŭgoj: ĉ. 40 km

⁴ Chōkai (ĉookai)

⁵ Nōin (nooin)

Saigyō¹: “remas sur sakuro-floroj”. Ĉe la bordo staras maŭzoleo, onidire, de Jingū-kōgō². La nomo de la templo estas Kanmanju³. Ni ne aŭdas, ke ŝia moŝto ĉi tien reale alvenis. Kiel do tio okazis? Sidante en la ĉefa ĉambro de la templo, levinte rulkurtenon, oni povas rigardi tutan panoramon per unu vido, sude la monton Chōkai subtenantan la ĉielon kaj spegulantan sian figuron sur laguno. Okcidente estas la bariero de Muyamuya⁴, kiu baras vojon. Oriente estas konstruita digo kaj etendiĝas longe la vojo kondukanta foren al Akita. Norde kuŝas la maro. La estuaro, kien ondoj eniradas, nomiĝas Shiogoshi⁵. La figuro de la laguno, kies lateroj estas unu leŭgon⁶ lon-gaj, jen similas kaj jen malsimilas al tiu de Matsushima⁷. Dum Matsushima ŝajnas esti gaje ridanta, Kisakata ŝajnas esti rankora. Ŝajnas al mi, ke la teraspekto aldonanta melankolion al tristeco, splenigas la spiriton.

Ha, Kisakata!
Mimozoj floras en pluv’
simile al Seishi⁸.

Agrablas kruroj
De grupoj estuare

¹ Saigyō (saigjoo): 1118-1190, samurajo, bonzo, utaisto

² Jingū-kōgō (jinguu-koogoo): 170-269, la edzino de la tennoo Chūai. Estas ne klare, ĉu ŝi estis reala aŭ fikcia.

³ Kanmanju (kanmanju)

⁴ Muyamuya (mujamuja)

⁵ Shiogoshi (ŝiogoŝi)

⁶ unu leŭgo: ĉ. 4 km

⁷ Matsushima (macuŝima)

⁸ Seishi (seiŝi): Xi Shi, ĉina belulino, pri kiu oni diras, ke ŝi estas unu el kvar plej belaj belulinoj en Ĉinio

de Shiogoshi¹.

Pri la festo Sora versis:

Ha, Kisakata!

Ĉi tie, kion manĝi

ĉe dia festo?

S-ro Teiji², komercisto el la provinco Mino, versis:

Fiŝistoj kune

vespere refreŝiĝas

sur pordpanelo.

Vidante neston de pandionoj sur la roko en maro, Sora versis:

Ho! Pandionoj

nestiĝis sur rokpinto

supera al ondoj.

Echigo-ji³

Rrestado en Sakata daŭris tagojn pro malinklino forlasi la lokon, sed ni turnis nin al nuboj sekvantaj la vojon al la provinco Hokuŝiku. Ĉagrenis mian koron tiel lontana vojo: onidire la distanco ĝis la urbo Kaga estas 130 leŭgojn⁴ longa. traŝirinte la barieron de Nezu, piedirinte plu laŭ la lando de Echigo, ni atingis la barieron de Ichiburi⁵ en la provinco de Etchū⁶. Dum ĉi tiuj 9 tagoj mi nenion skribis, ĉar min psike ĝenadis varmego kaj pluvo, kaj reaperis al mi malsano.

Julie, l' sesan

¹ Shiogoshi (ŝiogoŝi)

² Teiji (teĵi)

³ Echigo-ji (eĉigo-ĵi)

⁴ 130 leŭgoj: ĉ. 520 km

⁵ Ichiburi (iĉiburi)

⁶ Etchū (etĉuu)

l' vespero ŝajnas esti
alietosa.

La Lakta Vojo
etendas sin al Sado;
koleras l' maro.

Ichiburi¹

Hodiaŭ transirinte plej malfacilajn lokojn en norda lando, nomatajn oyashirazu-Koshirazu², Inu-modori³, Koma-gaeshi⁴, mi tre laciĝis kaj enlitiĝis tirinte al mi kapkusenon. tiam el la najbara ĉambro fronta al vojo, aŭdiĝis voĉo de du junulinoj kaj maljunulo. Mi aŭdis ilian flustradon, kaj eksciis, ke la junulinoj estas putinoj de la urbo Niigata en la provinco Echigo⁵. Ili estas irantaj al Ise por adorviziti la Sanktejon kaj la maljunulo akompanis ilin ĝis ĉi tiu bariero. Morgaŭ ili skribos leteron al la hejmo en sia vilaĝo. Li portos la mesaĝon tamen ne tro gravan. Ili diris, ke lasinte sin al bordo ĉe blanke ondanta maro, ili falis mizere en fiŝistan mondon kaj pro seksumado kun iuj ajn pekis ĉiutage je malbonsorta karmo. aŭdante kaj reaŭdante ilian rakontadon, mi endormiĝis. Kiam ni estis ekveturontaj matene, ili turnis sin al ni kun peto: “Estas malfacile por ni iri laŭ nekonata vojo kaj estas tiel time pro senscio pri okazontaĵoj. Kaj do ni volas iri post vi nerimarkite, kaŝe aŭ videble. Bonvolu kompati nin favore je viaj budhistaj vestoj kaj kunligi nin kun vi laŭ budhisma sorto.” tiel ili diris plorante. Kompatindaj ili ja estas, sed mi diris al

¹ Ichiburi (iĉiburi)

² Ooyashirazu-Koshirazu (ojaŝirazu-koŝirazu): loko, kie ne eblas zorgi eĉ pri gepatroj kaj gefiloj.

³ Inu-modori: loko, kie hundoj retiriĝas.

⁴ Koma-gaeshi (koma-gaeŝi): loko, kie ĉevaloj returniĝas.

⁵ Echigo (eĉigo)

ili: “Ni devos resti en multaj lokoj laŭ la vojo. Estos pli bone, ke vi iros sekvante aliajn laŭ iliaj vojoj. Nepre vin helpos Dio por bona vojaĝo.” Dirinte tion mi foriris, sed ĉe la ekiro mi ja ne ĉesis kompati ilin.

Ho, kun putino
mi bonzo dormis dome.
Lun’ kaj lespedez’ !

Mi rakontis al Sora, kio okazis, kaj tion li notis.

Kurobe

Estas dirite, ke la rivero Kurobe en delto disbranĉiĝas en 48 torentojn. Ni travadis sennombrajn riveretojn, kaj alvenis al la kreko nomata Nago. Mi volus rigardi visteriajn ondojn en la vilaĝo tako, pensante, ke, kvankam nun ne estas printempo, la aspekto devas havi propran specon de estetiko eĉ en la frua aŭtuno. Mi demandis iun pri ĉi tiu loko. Li respondis: “Necesas piediri de ĉi tie 5 leŭgojn¹ laŭ rifoplana marbordo kaj eniri malantaŭ tiun foran monton, sed ĝi troviĝas en la loko, kie estas nur domaĉetoj de povraj fiŝistaj, kaj do neniu luigos al vi ĉambron por unu tranokto.” tiel oni timigis nin, kaj ni antaŭeniris rekte al la provinco Kaga.

Al Arisoumi
rigardas mi en kamp’
de riz’ aroma.

Kanazawa²

Transpasinte la monton unohana kaj la valon Kurikara, ni atingis la urbon Kanazawa en la 15a de julio³. Ĉi tie nun estas hajkisto Kasho⁴, komercisto ofte

¹ 5 leŭgoj: ĉ. 20 km

² Kanazawa (kanazaŭa)

³ la 15a de julio: la 29a de aŭgusto laŭ la nuna kalendaro

⁴ Kasho (kaŝo)

venanta de Ōsaka¹. Ni loĝas kune kun li en lia kutima gastejo. Hajkisto Isshō², kies bonan reputacion je poezia vojo mi aŭdis sufiĉe, estis konata en la mondo, sed li mortis ankoraŭ juna en la lasta vintro. Lia pli maljuna frato okazigis kunsidon de hajkoj kiel ceremonion por la animo de la forpasinto. Mi versis:

Moviĝu l' tombo!
Plorado mia estas
aŭtuna vento.

Kiam oni invitis min al ies ermitejo, mi versis:

Aŭtuno friska!
Melonon, melongenon
mem senŝeligu!

survoja versado

La suno ardas.
Ni sentas tamen venton
jam fruaŭtunan.

La sanktejo de tada

En la loko nomata Komatsu³ mi versis:

Venteto blovas
modeste al miskantoj
kaj lespedezoj.

Ĉi tie ni adorvizitis la sanktejon tada. Ĉi entenas helmon kaj erojn de brokaĵo de la kostumo de Sanemori⁴. onidire, kiam li apartenis antaŭe al la klano Genji⁵, la

¹ Ōsaka (oosaka)

² Isshō (iŝŝoo): disĉiplo de Bashō

³ Komatsu (komacu)

⁴ Sanemori: Saitō Sanemori, 1111-1183, samurajo

⁵ Genji (genĵi)

generalo Yoshitomo¹ donacis al li ilin. Vere ili ne estas armiloj de ordinaraj soldatoj. oraj arabeskaj desegnaĵoj de krizantemoj estas gravulitaj sur okulŝirmilo kaj klapoj por oreloj kaj kolo, kaj krome kornoj de hoja formo estas almetitaj al la kresto de drako sur la krono. Post la morto de Sanemori en la batalo, la generalo KISO Yoshinaka² oferis lian relikvon kun sia peto por venko al ĉi tiu Sanktejo. En la kroniko estas skribite, ke Higuchi-no-Jirō³, vasalo de Yoshinaka, portis ĝin ĉi tien.

Mizera estas!

Sub helm' de samurajo

ho, ĉirpas griloj

Nata

Survoje al la varma fonto en Yamanaka⁴, malantaŭ ni videblis la monto Shirane⁵. Maldekstre ĉe la montpiedo staras unu templo de avalokiteŝvaro. onidire, bonzo-eksmikado Kazan⁶, plenuminte pilgrimadon al 33 sanktaj lokoj en la provinco Kinki, instalas ĉi tie la statuon de granda mizerikordo kaj nomis ĝin Nata. Li kunigis unuajn silabojn de la du sanktaj lokoj: Nachi⁷, de kie komenciĝis pilgrimo, kaj tanigumi, kie ĝi finiĝis. aranĝitaj estas diversaj kuriozaj ŝtonoj, kaj vice plantitaj estas malnovaj pinarboj. Malgranda herbotegita templeto estas konstruita sur la pinto de rokego. Vere, tio estas laŭdinda loko.

Pli blanka estas

¹ Yoshitomo (joŝitomo): Minamoto-no-Yoshitomo, 1123-1160, la patro de Minamoto- no-Yoritomo, kaj -Yoshitsune

² Kiso Yoshinaka (joŝinaka): sama al Minamoto-no-Yoshinaka, kuzo de Yoritomo

³ Higuchi-no-Jirō (higuĉi-no-ĵiroo): ?-1184, Higuchi Jirō-Kanemitsu (kanemicu)

⁴ Yamanaka (jamanaka)

⁵ Shirane (ŝirane)

⁶ bonzo-eksmikado Kazan: 968-1008

⁷ Nachi (naĉi)

aŭtuna vent' ol ŝtonoj
de ŝtona monto

Yamanaka¹

Mi baniĝis en la varma fonto. oni diras, ke ĝia efiko estas dua post tiu de la varmfontejo de arima.

Ho, Yamanaka!
Ne pluku krizantemon,
ĉar font' aromas.

La mastro de la banejo, nomata Kumenosuke, estas ankoraŭ knabo. Lia patro ŝatis hajkan mondon. Li estas konata en la mondo pro jena epizodo. Teishitsu² iam en la juneco, de la ĉefurbo Kioto alvenis ĉi tien kaj estis hontigita de li pri hajka estetiko, kaj do reveninte al Kioto, disĉipliĝis ĉe Teitoku³. Eĉ post kiam teishitsu akiris famon, li ne akceptis monon por korekti verkojn de ĉi-tieaj vilaĝanoj. tio nun estas jam epizodo de la fora epoko.

Sora malsaniĝis je la ventro kaj li foriris al Nagashima⁴ en la provinco Ise, ĉar tie li havas siajn parencojn.

Eĉ se mi falus,
mi morte kuŝu kampe
de lespedezoj.
(Sora)

Tiel li versis kaj lasis min. Malĝojo de foriranto kaj bedaŭro de forlasito faras nin kvazaŭ paro da vaneloj, aparte flugantaj en nuboplana ĉielo perдите unu de la alia. ankaŭ mi skribis hajkon.

¹ Yamanaka (jamanaka)

² Teishitsu (teiŝicu): 1610-1673, komercisto de paperoj, hajkisto

³ Teitoku: 1571-1653, hajkisto

⁴ Nagashima (nagaŝima)

Ekde hodiaŭ
forviŝu mi la vortojn
de kanĉapelo.

Zenshō-ji¹

Mi ekloĝis en la templo nomata Zenshō-ji, kiu staris en suburbo, ekstere de la kastelo Daishō-ji². Ĝi estas ankoraŭ ene de la teritorio de Kaga. Ankaŭ Sora tranoktis en ĉi tiu templo hieraŭ nokte, kaj postlasis sian hajkon.

La tutan nokton
aŭdeblas vent' aŭtuna
el dorsa monto

Disiĝo de nur unu nokto estas kvazaŭ apartiĝo de mil leŭgoj³. Ankaŭ mi, aŭdante aŭtunan venton, kuŝis en la pensiono. Ĉirkaŭ aŭroro klare sonis recitado de sutroj. aŭdinte batadon de metala plato mi eniris en manĝejon de la templo. Hodiaŭ mi iros al la provinco Echizen⁴. Kiam mi haste eliris el la templo, junaj bonzoj, portante paperon kaj tuĉŝtonon, sekvis min eĉ al la perono. Ĝuste tiam falis salikaj folietoj en la korton. Kvankam mi jam surmetis pajlajn sandalojn, mi skribis la sekvan hajkon.

Ho, mi ekiru,
foliojn balainte,
de via templo.

¹ Zenshō-ji (zenŝoo-ĵi)

² Daishō-ji (daiŝoo-ĵi)

³ mil leŭgoj: ĉ. 4000 km

⁴ Echizen (eĉizen)

Pino de Shiogoe¹

Apud la limo de la provinco Echizen², de la kreko Yoshizaki³ mi veturis per boato al la pinarbaro de Shiogoshi⁴. Iam Saigyō⁵ versis.

La tutan nokton
ventego furioza
alportis ondojn.
Pinoj de Shiogoe
en luna lumo gutas.

Per ĉi tiu utao estas elĉerpita la tuta pejzaĝo. Se iu aldonus unu vorton, tiu alfiksus kvazaŭ la sesan fingron.

Mi vizitis abaton de la templo Tenryū-ji⁶ en la urbo Matsuoka⁷, ĉar li estas mia malnova amiko. Ĝis ĉi tiu loko adorante vane akompanis min s-ro Hokushi⁸ el Kanazawa⁹, kvankam li volis nur diri al mi adiaŭon. Li strebis versi hajkojn pri pejzaĝoj survoje en diversaj lokoj, ne preterlasante ion ajn. Li kelkfoje esprimis al mi interesajn poeziojn. Kaj nun jam mi skribis ĉe la disiĝo de li.

Mi adiaŭe
disŝiris ventumilon,

¹ Shiogoe (ŝiogoe)

² Echizen (eĉizen)

³ Yoshizaki (joŝizaki)

⁴ Shiogoshi (ŝiogōshi)

⁵ Saigyō (saigjoo): 1118-1190, samurajo, bonzo, utaisto. La utao tamen ne estas farita de Saigyō, sed de la bonzo rennyo (1415-1499)

⁶ Tenryū-ji (tenrjuu-ĵi)

⁷ Matsuoka (macuoka)

⁸ Hokushi (hokuŝi): -1718, forĝisto-hajkisto

⁹ Kanazawa (kanazaŭa)

skribinte sur ĝi.

Enirinte 50 ĉoojn¹ en monton, mi adorvzitis la templon Eihei-ji². Ĝi estis malfermita de zen-majstro Dōgen³. Mi aŭdis, ke estis la sankta celo de la fondo en tiel profunda monto, mil leŭgojn⁴ fore de la ĉefurbo Kioto.

Fukui

Ĝis la urbo Fukui restis ankoraŭ 3 leŭgoj⁵. Do post vespermanĝo mi ekiris laŭ la vojo, kiun en krepusko mi sekvis ŝanceliĝante. Ĉi tie loĝas s-ro Tōsai⁶, malnova ermito. Iam li venis en la urbon Edo⁷ kaj vizitis min. Post tio pasis jam pli ol 10 jaroj. Kiel li kadukiĝis, aŭ ĉu li jam mortis? Demandis mi iun pri li, oni diris, ke li ankoraŭ vivas en iu loko. Li loĝas nerimarkate en la urbo kaj mi trovis aĉan dometon, sur kiu rampas volviĝantaj lagenarioj kaj lufoj, kaŝas pordeton celozioj⁸ kaj kenopodioj⁹. Konvinkiĝinte, ke certe li loĝas en ĝi, mi frapis je la pordeto. tiam povra virino aperis, kaj diris, “De kie vi alvenis, s-ro migranta sanktulo? La mastro iris proksimen al iu. Se necese, bonvolu iri tien.” Videble ŝi devas esti lia edzino. Mi pensis, ke tia sceno troviĝas nur en malnova klasika literaturo. Baldaŭ ni renkontiĝis kun li, kaj mi loĝis

¹ 50 ĉooj: ĉ. 5.5 km

² Eihei-ji (eihei-ji)

³ Dōgen (doogen)

⁴ mil leŭgoj: 4000 km; tio signifas ne realan distancon, sed tre tre malproksime de la ĉefurbo

⁵ 3 leŭgoj: ĉ. 12 km

⁶ Tōsai (toosai): hajkisto

⁷ Edo: nun tokio

⁸ celozio: *Celosia argentea*

⁹ kenopodio: *Bassia scoparia*

ĉe li en la dometo du noktojn. Poste mi ekiris al la haveno de Tsuruga¹ por rigardi tie la plenan lunon. Ankaŭ tōsai volis min akompani, kaj ĝojplene gvidis nin al la vojo, refaldinte baskon de kimono komike.

Tsuruga

Pli kaj pli kaŝiĝis la monto Shirane-ga-take², kaj aperis la monto Hina-ga-take. Transirinte la ponton asamuzu, ni alvenis al tamae, kie jam spikiĝis kanoj. Ni trapasis la barieron de uguisu-no-seki kaj trans - iris la montokolon Yunoo-tōge³, kaj alvenis al la kastelo Hiuchi-gajō⁴.

Mi aŭdis gakadon de unuaj sovaĝanseroj en aŭtuno apud la monto Kaeru-yama⁵. En la krepusko de la 14a tago⁶ ni trovis gastejon en Tsuruga⁷ ĉe la haveno.

Tiun vesperon la luno estis aparte hela. Mi diris: “ankaŭ la morgaŭa nokto estu tia!” oni respondis: “Kutime en ĉi tiu provinco Koshiji⁸, oni ne certas, ĉu fariĝos serene aŭ ne en la sekva nokto.” tion dirante, la gastejestro rekomendis nin trinki sakeon. Vespere ni adorvizitis la sanktejon de Myōjin⁹ Kei. Ĝi estas maŭzoleo de tennoo Chūai¹⁰. La fasado de la sanktejo estas plena de dieco, lunlumo enradiis inter pinarboj, kaj blanka sablaro antaŭ la sanktejo estis kvazaŭ kovrita de prujno.

¹ Tsuruga (curuga)

² Shirane-ga-take (ŝirane-ga-take)

³ Yunoo-tōge (junoo-tooge)

⁴ Hiuchi-ga-jō (hiuĉi-ga-ĵoo): la kastelo iam apartenis al KISo Yoshinaka.

⁵ Kaeru-yama (kaeru-jama)

⁶ la 14a tago: la 27a de septembro laŭ la nuna kalendaro

⁷ Tsuruga (curuga)

⁸ Koshiji (koŝiji)

⁹ Myōjin (mjooĵin)

¹⁰ tennoo Chūai (ĉuuai): la 14a tennoo, sed estas ne certe, ĉu li reale vivis aŭ ne.

Antaŭlonge la dua migranta ĉefbonzo faris grandan voton mem falĉadi herbon, alporti teron kaj ŝtonojn kaj sekigi ŝlimejon. Jen tiel malaperis ĝeno por adorvizitadi. Ĝis nun tiu tradicio ne ĉesis, kaj oni alportis puran sablon antaŭ la altaro. tio nomiĝas “sabloportado de migrantaj sanktuloj.” tion parolis la gastejestro.

Serenas luno.
amasas sablo sur la ter’
far’ de migrantoj.

En 15a tago¹ pluvis ĝuste kiel dirite de la gastejestro.

Jen bela luno
atendata! Sed en lando
norda ne eblas.

Iro-no-hama

En la 16a tago² sereniĝis la ĉielo. Volante preni ruĝajn konkuletojn nomatajn masuho³, mi veturis 7 leŭgojn⁴ per ŝipo al la plaĝo Iro-nohama. Iu sinjoro, nomata Ten’ ya⁵, preparis zorgeme portmanĝaĵojn kaj bambuajn tubojn da sakeo, kaj enŝipigis multajn siajn servistojn. Kun vento al pobo ni tuj atingis la celon. Sur plaĝo staris malmulte da dometoj de fiŝistoj kaj troviĝis mizera templo de budhisma branĉo de Nichiren⁶. Ĉi tie ni trinkis teon kaj varmigitan sakeon. En la vesperkrepusko estis tiel solece, ke mi ege sentis min kortuŝita.

Jen sur la plaĝo
pli multe regas tristo,

¹ la 15a tago: la 28a de septembro laŭ la nuna kalendaro

² la 16a tago: la 29a de septembro laŭ la nuna kalendaro

³ masuho: *Donacilla picta*

⁴ 7 leŭgoj: ĉ. 28 km

⁵ Ten’ya (ten’ja): komercisto-hajkisto

⁶ Nichiren (niĉiren): 1222-1282, bonzo, fondinto de Nichiren-budhismo

ve, ol en Suma.

Post ondoj restas
petaloj lespedezaj
kun etaj konkoj

Mi petis de Tōsai¹ skribi skizon de la tago kaj restigis ĝin en la templo.

Ōgaki²

Ankaŭ Rotsū³ venis renkonte al mi ĝis la haveno kaj akompanis min al la provinco Mino. Kun helpo de ĉevalo mi eniris en la urbon Ōgaki. ankaŭ Sora alvenis de Ise, kaj ankaŭ Etsujin⁴ venis, rajdante sur ĉevalo. Ĉiuj kolektiĝis ĉe la domo de Jokō⁵. Vizitadis min tage kaj nokte s-roj Zensenshi⁶, Keikō⁷ kun sia filo, kaj aliaj intimuloj. Jen ili ĝojegis kaj zorgis min, kvazaŭ ili renkontus reviviĝinton. antaŭ mia revigliĝo post laciga vojaĝo, jam en la 6a tago de septembro⁸ mi ekveturis per ŝipo por vidi la ceremonion de la transmeto de diaĵo en Ise.

Aŭtune dise
vojaĝos ni samkiel
molusko-konko

¹ Tōsai (toosai): 1805-1890, hajkisto

² Ōgaki (oogaki)

³ Rotsū (rocuu): -1738, hajkisto

⁴ Etsujin (ecujin): 1656-1739, hajkisto

⁵ Jokō (Ĵokoo) : -1708, hajkisto

⁶ Zensenshi (zensenŝi): hajkisto

⁷ Keikō (keikoo): hajkisto

⁸ la 6a tago de septembro: la 18a de oktobro laŭ la nuna kalendaro